

EKO 2025

Bleko kun eĥo

EKO 2025-03, Januaro 16. Pezo: 399 KB, Alkroĉaĵo: Ni semas.. Sume 300 KB

Oni limigas la Esperanto-ekzamenojn en Hungario

La ŝtata lingvo-ekzamena centro ONYC en Hungario ĵus antaŭ Julio decidis ne plu organizi Esperantajn ekzamenojn. Laŭ ilia plano la lasta ekzameno okazos en la februara ekzamena sesio. Sed poste leviĝis la ideo de oktobra eblo. Laŭ la letero de vicdirektorino Melinda Szűcs oni decidis pri la ĉeso pro la malalta kvanto de aliĝintoj en 2024, entute nur naŭ personoj. Kontraŭ la alilingvaj ĝeneralaj tendencoj al Esperantaj ekzamenoj aliĝis nur plenkreskuloj, pro sporadaj diplomaj kialoj (kaj ne mezlernejanoj). Konsidere la realajn perspektivojn (ekz. en la kazo de Esperanto laŭ la leĝo oni ne repagas la altajn ekzamenajn kotizojn, ĝi ne plu estas konsiderata ĉe le eniraj universitataj poentoj, ktp) - do ne estas atendebla la kresko de la kvanto de aliĝintoj, la organizado de ekzamenoj pri Esperanto por la Centro estas malprofita...

Tio signifas, ke fermiĝus en Hungario la sistemo pri ŝtate rekonitaj ekzamenoj por Esperanto. Ĝi komenciĝis en 1966 lige kun la tiujara UK en Hungario, kaj dum ĝia ekzisto sukcese trapasis la ekzamenon - ĉ. 40.000 homoj.

Ja ekzistas pli ol dek aliaj malgrandaj lingvoj (*bulgara, cigana, dana, finna, japana, ĉina, pola, novgreka, malnovgreka, portugala, rusina, slovena*) kiuj havas malpli grandajn aŭ nulan kvantojn de ekzamenitoj..Tiuj lingvo-ekzamenoj tamen ne estas haltigitaj... (vidu: https://nyak.oh.gov.hu/doc/stat/stat_disp.asp?strID=G0)

Ne estas klare, ĉu la 'ĉesigo de organizado de Esperantaj ekzamenoj' signifas fermon de la tuta sistemo, aŭ nur ĝian dumtempan ĉesigon.

Koncizigita Laŭ teksto de Szilvási László post vasta konsultado

Informoj pri la eblo ekzameniĝi en oktobro:

<https://www.facebook.com/photo?fbid=960011226225735&set=a.532264965667032>

Pálma Csiszar

Reage al la decido de ORIGO reprezentantoj de hungariaj Esperanto-organizaĵoj kaj gvidanto de la KER-Ekzamena Centro de UEA kunsidis kaj interkonsentis pri komunaj reagoj kaj elpaŝo, kadre de kiuj estis skribitaj leteroj al la hungara instituto.

Responde la direktorino fine de januaro akceptos la delegacion de la esperantistaro por intertraktado. Kiel ajn, nepras ke por la du ekzamensesioj (februaro kaj novembro 2025) estu pruvita pli vigla intereso de hungaroj kaj trapasu ekzamenojn kelkdekoj da personoj.

Tekso konsentita kun Katalin Kovats

Ĉina babilado per Viĉato

Nun *We-Chat* estas rapida kanalo, per kiu oni kontaktas ĉinajn esperantistojn. Mi renove redaktis la suban mesaĝon kaj sendis ĝin al tiuj esperantaj grupoj ĉe *We-Chat*, inkl. la grupo de la komitatanoj de Ĉina Esperanto-Ligo. La plej granda parto de ĉinaj esperantistoj kaj kelkaj eksterlandaj esperantistoj jam legis ĝin.

Wu Guojiang, prezidanto de Liaoning-a Esperanto-kultura Klubo, Ĉinio

AMO en Kroatio, Pollando kaj tra Afriko

AMO-seminarioj en Kroatio okazos februarie pri Amikeco kaj novembre pri literaturo. Ambaŭ sub la prizorgo de AMO-komisionano Majija Beloŝeviĉ. Seminario estas planata en Pollando sub la prizorgo de komisionano Małgosia Komarnicka, eble en majo. Sekvar raporto pri la planoj por AMO en Afriko:

“Mi kore dankas al vi ĉiuj pro via sindonemo por kunorganizi AMO-seminariojn. En 2025, okazos AMO seminario en DR Kongo, en Kenjo kaj en Gambio kun ĉefa temo: organizado de la movado. Subtemoj estas:

1. Mastrumado de kluboj
2. Organizado de kunsidoj
3. Organizado de ĉeestaj kluboj en lernejoj
4. Organizado de retaj kursoj
5. Solvado de konfliktoj

Por bona organizado, tiujn seminariojn kunorganizos la afrika komisiono. Aliflanke, mi sentas bezono organizi virtualajn AMO-seminariojn pri mastrumtemoj por havi pli da aktivuloj, la esperantistaro tion bezonas.”

Jeremie Sabiyumva, estrarano de UEA interalie pri AMO

La renoma itala kongreso jam invitas

La 91-a Itala Kongreso de Esperanto okazos en Salsomaggiore Terme de la 23-a ĝis la 30-a de aŭgusto 2025. Baldaŭ disponeblaj la aliĝilo kaj ĉiuj detalaj informoj. Ne maltrafu la okazon partopreni! Ni finfine povas anonci ĝin!

En la nova taglibro de 2025, marku la datojn: semajno da renkontiĝoj, seminarioj, kursoj, koncertoj, ekskursoj kaj multe da amuzo atendas vin kune kun esperantistoj el la tuta mondo. Ni malkaŝas al vi, ke ni estas organizantaj apartan programon por infanoj (5-13 jaraĝaj), tiel ke la gepatroj povu trankvile ĝui sian kongreson.

Prof. LAURA BRAZZABENI, Presidente FEI

La subskribo de Laura havas la tekston:

“La interna ideo de Esperanto estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton.” (L. L. Zamenhof)

Belorusia movada sentas junularan impulson

La 14-an kaj 15-an de decembro 2024, okaze de la Zamenhofa Tago, grupo da junaj esperantistoj el Belorusio kaj Moskvo prezentis Esperanton en Minsko kaj Grodno por allogi novajn homojn al la renaskiĝanta Esperanto-movado en Belorusio. Legu pli en *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2024/12/belorusio/>

SMG: Bona novaĝo, ĉar la movado en tiu lando estis tre modesta. Junulara – junulkara.

La franca Eo-kastelo Greziljono invitas al siaj kursoj:

Apr-18/27: PRINTEMPAS, intensivaj kursoj por ekzamenoj kun Zsófia Kóródy, Marion Quenut, Konstantin Tikhomirov, Paweł Fischer-Kotowski. gresillon.org/p

Jun-30/jul-10: Maratona Esperanto-kurso kun Dennis Keefe, Nedeljka Ložajić, Frank Lappe, ankaŭ por blinduloj, kun Internacia Eo-Konferenco. gresillon.org/m

Aŭg-24/29: Verda Naturisma Semajno, kursoj kun Thierry Spanjaard, Didier Loison: gresillon.org/n

Okt-24/nov-02: AŬTUNAS, kursoj kaj FEI-ekzameno kun Renée Triolle kaj aliaj. gresillon.org/au

Ĝianfranko la karmemora

Por omaĝi Ĝianfranco Molle, la plej faman italan kantiston, tutmonde konatan, animon de 'Muzika Kulturo' la itala movado organizas konkurson pri kanzonoj originale verkitaĵoj en Esperanto. La komisiono povos asigni maksimume tri premiojn.

La rezultoj estos anoncigitaj enkadre de la itala kongreso de Esperanto, dum specifa programo. Ĉiu persono rajtas konkursi per maksimume tri verkoj, kiuj devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp). Maksimuma daŭro de kanzono estas 5 minutoj. La gajnintoj de la unua premio ne rajtas partopreni en la konkurso dum la sekvaj tri jaroj. La konkursaĵojn oni sendu al la sekretario, Valerio Dalla, per retmesaĝo, al la adreso concorso@esperanto.it indikante la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson; ili estu kantitaj kaj luditaj en aŭda formato mp3 aŭ ogg, kaj skribitaj (nur vortoj, eventuale kun akordoj) en teksta formato doc aŭ odt.

Premioj: la gajninto de la unua premio, premio Ĝianfranko, ricevos monpremion de € 200; por la aliaj la premio konsistas el esperantlingvaj KD-oj. Limdato por la sendado estas la 30-a de majo de la koncerna jaro. Juĝkomisiono: prezidanto: Laura Brazzabeni, sekretario Valerio Dalla, juĝantoj: Pierluigi Cinquantini, Martin Wieser, Flo Martorell. La sekretario informos ĝis la 1-a de aŭgusto la gajnintojn pri la premio. La partoprenantoj cedas senpage al IEF por la unua jaro la rajton je unua publikigo.

Por pliaj informoj : concorso@esperanto.it , Prof. LAURA BRAZZABENI Presidente FEI

Afabla laŭdo por EKO

“Mi elkore dankas pro via daŭre informilo EKO por nia Esperanto-mondo”

. Jennifer Bishop. Australio kaj Britio

Facila sento

<https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/esperanto-kiel-ponto-inter-kulturoj-r458/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/homoj/mortis-hungara-verkisto-istv%C3%A1n-nemere-r459/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/esperanto-kiel-ponto-inter-kulturoj-r458/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/%C4%9Denerale/esperanto-kaj-la-movado-de-nova-kulturo-en-%C4%89inio-r460/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/tra-la-reto/reklam-filmeto-en-esperanto-r461/>

Togolanda elpaŝo

Fermiĝs la 3-a Arta Salono de Lomeo. La aranĝo estis unika momento renkontiĝi kun ŝlosilaj fakuloj kaj agantoj de la arta kaj kultura mondo el diversaj horizontoj, interŝanĝi ideojn kaj malkovri novajn aferojn. Nome de Esperanto-228 S-ino M. Judith Kossivi, Koufionou Koffitché kaj mi havis budon pri Esperanto kaj dum la tuta periodo de la Salono deĵoris, informis, varbis kaj enkondukis kursetojn pri la internacia lingvo. Aparte en la tago de lundo la 30-an de decembro ni trio prentis antaŭ la Salona publiko Esperanton kaj verkaĵojn de afrikaj e-istoj kun speciala prezento de mia libro "Afrikaj proverboj" kiel parto de literatura kafejo. Ni ĝojas malkovrigi Esperanton al pli ol unu persono dum la Salono kaj interagi kun eblaj esperantistoj.

Adjévi Adjé

Seminario en la burunda ĉefurbo

La seminario okazis de la 20-a ĝis la 22-a de decembro 2024 en la Esperanto-centro en Rumonge. Partoprenis esperantistoj el Buĵumburo, Rumonge kaj Nyanza-Lac. La Burundaj seminarianoj mem financis la seminarion. **Alk estas 1p.**

IEF invitas vin partopreni en la evento:

Babilado kun la **prezidanto** kaj **sekretario** de Eŭropa Esperanto-Unio (respektive **Séan Ó Riain** kaj **Luigi Fraccaroli**) pri **Eŭropa Esperanto-Unio, la komuna hejmo por la eŭropa esperantistaro: kialoj, celoj, strategio** .

Aranĝas Itala Esperanto-Federacio, Enkondukos **Laura Brazzabeni, IEF-prezidanto.**

la 21-an de januaro 2025 je la 21.00 UTC+1 en Zoom

<https://us02web.zoom.us/j/82993069047>; sen pasvorto

Prof. LAURA BRAZZABENI, Presidente FEI

===== vortoj: 985 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komuniko iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Ĉ1/16/2025iuj perintaj komunikoj le1 2024 egeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

La kvardek kvarnumeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.